# SENNACIULA LIBERPENSULA PAĜO

N-o 13 REDAKTAS LIBERPENSULA SEKCIO DE SAT N-o 13
Manuskriptojn sendu al: KURT HUBRICHT, Leipzig O 30, Mariannenstrasse 22. Sekretario de la Sekcio: KURT KLAPS, Danzig, Karpfenseigen 12.

## VINTRO-SUNTURNIĜO

(Parolado je la vintro-sunturniĝa-soleno 1929 en Erchaŭzen)

La aŭtuno, kiu alportis ankoraŭ kelkajn belajn tagojn, estas nun finita kaj anstataŭita per la vintro. Jam ĉiam oni ekkonis, ke la vintro kun siaj mallongaj tagoj kaj longaj malhelaj noktoj estas obstina malamiko de la vivo. Jen dormas la naturo; la tero kovras sin per neĝo, kaj plenaj je malespero la senfoliaj arboj etendas siajn branĉojn en la spacon. Multaj birdoj transloĝiĝis en pli varmajn landojn, kaj la postrestantaj pasigas penplene sian vivon. Nokte la ventegoj kriegas sian teruran melodion, kaj la neĝo transformiĝas je malmola glacikrusto. Dum la tago la suno lasas sin vidi nur mallongan tempon malantaŭ nuboj kaj nebuloj. Apenaŭ ĝi estas leviĝinta en oriento, jen ĝi lace malleviĝas en okcidento.

Sed tute aliel estas en malproksima sudo. Tie ĝojigas la suno ankoraŭ dum ne malmulte da horoj la homon per sia luksego, tie lumas la blua ĉielo, la birdoj pepas siajn gajajn kantojn, la naturo diboĉas en floroj, kaj la papilioj flugetas tra la aero.

Sed en la eterna fluado de la okazoj ŝanĝiĝas la tempoj. Dum la terglobo ruliĝas pluen, en sudo devas vintriĝi, sed ĉe ni disfaldiĝas la luksego de la somero. Tiutempe ĉe ni kantas la birdoj siajn ĝojegajn sonojn, kaj la rozoj floras en admirinda belo.

Iam ekzistis tempo, kiam oni ankoraŭ sciis nenion pri la cirklairado de la tero; tiam oni ankoraŭ ne sciis, ke planedoj turnadas sin ĉirkaŭ la suno; tiam oni povis nur admiri en pia timo la okazadon. Infane oni imagis la naturfortojn kiel personojn, kiuj precize kiel la homoj pensas, sentas la orelon, kiuj estetike tuŝas nin ankaŭ hodiaŭ. Ni aŭdas la kanton de la blinda bardo pri la batalo inter lumo kaj mallumo, ni vidas la lumdion alrajdi sur blanka ĉevalo. En altsvingita mano li tenas flamantan glavon kaj bataladas kolereme kun la demono de la nokto. Kiel ĉi tiu demono defendis sin malespere! Sed fine la ŝildo estas disbatita al li, la lanco forfaligita, kaj sian nigran ĉevalon li instigis al forrapido. Ĉiun jaron dum vintro-sunturniĝo ĉe niaj pragepatroj maljuna kantisto kantis ĉi tiun kanton. En profunda kaj pia silento la antikvaj germanoj aŭskultis lin. Poste la praavino, tio estis la plej maljuna virino de la hordo, venigis ŝtipon da seka ligno, kiu kuŝis kaŝita sub oferŝtono. Ĉi tiun ŝtipon ŝi ekbruligis per sia fajroligneto, kaj dume ŝi parolis rimarkindajn preĝojn, kaj sorĉofrazojn. Jen ekflamas alten la lumo kaj anoncas en malhela nokto la novan tagon. La tuta popolo, de la junulo ĝis la maljunulo, dancadas ĝojege ĉirkaŭ la fajro. Ĉiam pli vastaj fariĝas la rondoj, ĉiam pli petolaj fariĝas la saltoj, kaj ĉiam pli forte sonoras la kanto je la honoro de l' sundio. De tiu dio, kiu kun la soleno de la sunturniĝo rompas la regadon de la vintro kaj denove donacas pli longajn tagojn al homo . . .

Du jarmiloj nun estas malaperintaj, kaj en malproksima nebulo troviĝas tiu tempo. La homo liberigis sin el la infaniluzio de la pratempo kaj subigis la trompobildojn de siaj sentoj. Li ne plu bezonas la superstiĉon de siaj prapatroj, ĉar li lernis *pensi*. Per senlaca pacienco la esplorantoj serĉas penetri en la sekretojn de naturo, vivo kaj socio. Malfermiĝas al ilia spirito la direkto de la polusoj, la vojoj de la tero kaj ties ŝanĝebla loko al suno. Nuntempe ni scias, kial en alterna dancado la sezonoj preterpasas al ni, kial ni devas travivi la tagojn jen en riĉa florornamo, jen en vintrovestaĵo. La poemojn de la malnovaj majstroj pri la migrado kaj la aventuroj de la sundio ankaŭ ni modernaj homoj povas kunsentante travivi, sed ni envicigas ilin tien, kien ili apartenas: en la regnon de fantazio kaj revoj. Sed se ni volas serĉi la veron, tiuj revoj ne povas esti kompetentaj por ni, tiuokaze ni povas nur fidi sciencon. Per kuraĝa rigardo ekkonas la esploranto la leĝecon de la tutmondo, per la teleskopo li migras en pli kaj pli vastajn malproksimojn, kaj la revo malaperas, kie mezuro kaj nombroj valoras. Ni ne bezonas sopire genui kaj preĝi antaŭ la sundio, ĉar netuŝate de homdeziro kaj homfeliĉo la suno devas plenumi siajn vojojn laŭ eternaj gravaj leĝoj. Ni bezonas nek preĝi nek danki al iuj dioj, ĉar la naturleĝoj, ĉe kiuj ĉia arbitro estas neebla, destinadas tiel devige la vojon de la planedoj kiel ankaŭ la vojon de ĉiu speciala homo de naskiĝo ĝis morto.

Pli ol iu revema kredo firmigas nin la scio, ĉar se ni konas la naturleĝojn, tiaokaze ni povas senĉese plibonigi nian vivon. Ankaŭ ĉiuj produktemaj ideoj estas enŝpinataj en la reto de kaŭzo kaj efiko, kaj konsciante, ke ĉi tiuj ideoj ne senefike pereas, sed grade kulturas la pli altan homon, ni atingas ĝojan, vivjesan, esperplenan mondrigardon.

Por dio tro grandega fariĝis la mondo, kaj ĉiuj homarorevoj postrestas vaste malantaŭ la senfineco. Ne unu, sed sennombraj sunoj moviĝas en tute difinitaj vojoj, nemezureble etendas sin la spacoj, senlima estas la tempo, kaj ĉiu okazado estas eternaj estiĝo kaj pereo. Kie astro malaperas, jen ni jam havas en gigantaj nebularoj la materialon por novaj mondformoj, por novaj sun- kaj planedsistemoj. Kaj en la mastrumado de la ĉio-unu, de la naturo, nia tero estas nur malgrandeta polvereto. Rigardante tiajn dimensiojn, la homo fariĝas tre modesta, la homo, kiu iam kredis sin centro de la universo kaj opiniis, ke nur liajn ĝojojn kaj suferojn kaj animsavon celas la senco de la tutmondo, kiu pro iluzio pri propra grando perdis ĉian mezurkapablon kaj eĉ revis pri du mondoj, kiujn li ambaŭ volus vivmalsate ekkapti. Sed kio estas la homo reale? Ereto da polvo, momento en eterneco!

Malgraŭ ĉio ni ne bezonas perdi nian memkonscion, ĉar la scio ankaŭ suprenlevas nin. Montras al ni, kiel la homo, kiu kiel ĉiuj vivaĵoj fondas sian ekziston sur sunforto, lukte trapenetris en la kuro de la evoluo ĝis sia hodiaŭa alto kaj kiel li daŭre akrigis siajn sentojn kaj intelekton kaj per tio treege superis ĉiujn aliajn kreaĵojn. Per la lingva ilo la homoj povis interkompreni sin kaj tiele starigi la grandiozan konstruon, kiu diferencigas ilin de la bestoj: la fenomenon de la kulturo.

La scienco instruas la homon, organizi sian mallongan vivon, por ke ĝi ne forbloviĝu senutile en la vento, signifoplene per vortoj kaj agoj. Ĉi tiuj agoj transdaŭras en siaj efikoj la vivon de la individuo kaj tiele ŝpinas pluen la ekzistfadenojn. La unue limigita "mi" kreskas je ampleksa homaro-mi, por kiu amo kaj justo ne plu estas malplenaj vortoj. Alligante pli kaj pli novajn akirojn al malnovo, la homo efektivigas pli kaj pli la idealon pri la pli alta homo por estonto, la superhomo-idealon.

Hodiaŭ ni ja estas ankoraŭ malproksimegaj de ĉi tiu celo. En freneza malsaĝo milionoj da homoj dum la terura mondmilito estas mortigitaj aŭ kriplopafitaj, kaj dum la inflacio per senkonsciuloj nia popolo senkuraĝiĝis ĝis malespero. Ne malmultaj konvertas sin je la spiritisma superstiĉo, alkroĉas sin ree al transmonda kredo kaj opinias, per tabloleviĝo interrilati kun la fantomoj de la mortintoj. Preskaŭ ĉiuj eŭropaj ŝtatoj havas debetojn, kaj la tero similas ruinamason. Militoj furiozas ĝis la hodiaŭa tago, kaj la homa feliĉsopiro estas mokata kiel malsaĝa utopio. Senlaboreco, loĝejo-manko kaj — neforgeseble! — ekspluatado en terura